# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013

2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-02 sendita el Budapeŝto la 16an de januaro. Kontrolo el Benino.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## ILEI kaj UEA sisteme pridemandas siajn sekciojn

**ILEI:** La instruista ligo agas modele. Ĝia estraro dissendis demandilon al siaj sekcioj por sisteme arigi informojn pri ilia agado en 2020. La limdato por respondoj estas marto 2021. Tamen, tro da sekcioj ne montras vivosignojn, situacio, kiun la Ligo nepre atentu.

**UEA:** En tiu asocio nek la Oficejo nek la Estraro okupiĝas mem pri tio, sed komisiito pere de <Landa Parad'>, kies rezultoj legeblas ĉe <aktivulo.net>. Por Azio, Eŭropo kaj MONA (Meza Oriento kaj Norda Afriko la lasta aktualigo okazis en la fino de 2020. Ene de la sekva semajno la dissendo de korektofolioj al Asocioj tra Latinameriko kaj Afriko disiros. Restas nur kvar landoj, kiuj estos arigitaj en nova regiono 'Pacifiko'. Temas pri Aŭstralio, Nov-Zelando, Usono kaj Kanado. Tiuj landoj homogenas laŭ vivnivelo kaj kultura fono, kaj vere ne konvenas esti traktitaj tradicie – Oceanio kun Azio, Nordameriko kun Latinameriko. La celo estas, ke ĝis marto 2021 la tuta mondo estos traktita.

## EKO 2020 nun kompleta en <aktivulo.net>

Vizitu tion en tiu retejo sub la titolo 'Agadaj Raportoj> 2020. La tuto aperas tie. Rekorde, aperis 60 komunikoj en de la jaro. La projekto insiste laboradas por levi la rolon de regionaj, landaj kaj lokaj agadoj.

## Vinilkosmo plue agadas, eldonas

https://mail.google.com/mail/u/0/?hl=en#inbox/FMfcgxwKjnVGxWLfZhxnKzJlhwzswXfg

Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ilei

Redaktoroj: Stefan MacGill kaj Mirejo Grosjean



**ENHAVO**

- Enketado landa
- ILEI iras al Benino
- Asizo invitas
- Fotoj de Greziljono
- Riskemas vi?

# Brava decido por niaj instruistoj!

## Transformiĝo de nia KONGRESO 2021 : ILEI iros al Benino!

Kiel estrarano 'Unika' laboris por prepari nian Kongreson en Edinburgo. Ŝi renkontas tie malfacilaĵojn. La Loka Kongresa Komitato ja konsistas nur el unu persono – ja diligenta kaj afabla persono. La kongresejo estus la kvakera domo, kiu tamen estus je nia dispono nur ekde lundo matene kaj malfacilis krei aliajn solvojn. Malmendo multekosta kaj postulata jam en majo. Devus okazi simpozio en kunlaboro kun la grupo de profesoroj kaj esploristoj en la universitato de St Andrews ; ĝis nun neniu firma decido pri kunlaboro.

Pro la pandemio en la kvakera domo en Edinburgo rajtas sidi nur kvar personoj en salono kun 40 sidlokoj. Plie kiel ni povis konstati ekde la komenco de la pandemio NENIU POVAS ION PLANI. Por organizi kongreson, ni devas plani… Kiel aspektos Edinburgo en julio, neniu povas diri.


Pro tio la Estraro en sia kunsido de la 8-a de januaro aludis al… nuligo… aŭ esploro pri nova loko… Ĉu en Eŭropo aliloke ? Ne, ĉar la pandemio skuas la tutan Eŭropon.



Nova solvo, decido, kiu aperis en plia estrarkunsido la 12-an de januaro : Ni kongresumos en **Kotonuo, Benino, la 7-an ĝis 14-a de aŭgusto 2021.**

Renkontiĝo en hotelo JoCa (vidu la foton) kun esperantista etoso kaj agrabla kunvivado, kaj virtuala evento por interesatoj en la tuta mondo. Do temas pri hibrida evento. Privas Tchikpe prezidos la lokan kongresan komitaton (LKK) Mirejo Grosjean laboros kiel membro de LKK. Aliaj esperantistoj loĝas en Kotonuo, ILEI kontaktos ilin, ĉefe junulojn.

Planata estas dutaga simpozio kadre de la Kongreso. Respondecos estrarano Radojica Petrović kunlabore kun la Universitata laborgrupo de CED/ESF/ILEI. Kunvenigonte ĉeeste kaj neĉeeste esperantistajn kaj nesperantistajn universitatanojn, la simpozio celas emfazi Esperanton kiel lingvistikan studtemon kaj doni impulson al klerigado per Esperanto.



Por efike plani, ni faru tiel : eblaj partoprenontoj anoncu sian intencon partopreni ĝis la fino de majo. Tiam, post esploro de la pandemia situacio en Benino kaj analizo de la aliĝanoncoj, la Estraro kaj LKK decidos, ĉu vere io okazos en Kotonuo. Do ĝis tiam pripensu, esploru, kalkulu. Malkovru Beninon en www.eo.wikipedia.org, kaj serĉu tie JoCa. Plie en la blogo mirejo2020.blogspot.com de la prezidanto estas ĉapitro kun nomo Kotonuo, Benino, 2021. https://mirejo2020.blogspot.com/2021/01/kotonuo-benino-2021.html Tie vi trovos plej diversajn informojn.

La preztabelo aperos tie kaj en la retejo de ILEI www.ilei.info la 16-an de januaro. La anoncoj pri intenco partopreni iru al ILEI per kreota reta dokumento.

Informoj pri JoCa kun historio pri la Eo-renkontiĝoj, kiuj jam okazis tie: https://eo.wikipedia.org/wiki/JOCA

Mireille Grosjean, prezidanto.

Foto: La hotelo JoCa nokte en la korto.

## Hungaraj ĝisdatigoj

Pretas la literoj S kaj Sz de EHV Hungara-Esperanta vortaro kaj elŝuteblas ĉe la suba ligo en pdf-formo: http://www.vortaro.hu/vortaro.htm
Ni atendas kaj konsideros viajn sugestojn pri korekto, plibonigo kaj kompletigo. Fine de la literoj S kaj Sz vi trovos mallongigojn ĝeneralajn, de organizoj kaj la landokodojn, uzatajn en la vortaro. La literoj S kaj Sz enhavas sur 161 paĝoj, 2598 kapvortojn, 6496 ekzemplojn, 102.09 vortojn. Intertempe okazis ĝisdatigoj kaj kompletigoj al aliaj partoj de tiu reta vortaro, legebla en saĝtelefonoj.

## Asizo (Assisi) atendas vin

La Loka Kongresa Komitato (LKK) rekomencis la laboron por pretigi neforgeseblan kongreson – la 88-an – en Asizo de la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto ĉi-jare. Bonvolu noti ke la kongreso ekos en vendredo kaj ne en sabato. La esperantistoj kiuj aliĝis pasintjare estas aŭtomate aliĝintaj al la ĉi-jara kongreso sen krompago. Ni komencas reordigi la koncernan paĝaron http://kongreso.esperanto.it kie iom post iom aperos la ĝisdatigitan programon. Por pliaj informoj skribu al kongreso@esperanto.it

Sendintoj: laura, michela, riccardo, paola, ugo

## Fotoj de Greziljono, preta por 2021

Ĉiuj volontuloj de Greziljono bone fartas kaj preparas sin por reveni al vera vivo. Staĝoj okazos en aprilo, julio kaj aŭgusto (vidu gresillon.org/agendo), komencante per la kursaro PRINTEMPaS (gresillon.org/printempo) kies aliĝo jam eblas (gresillon.org/aligho).

Niaj laboremuloj preparas la novan PMR-ĉambron por homoj en rulseĝo (gresillon.org/pmr) por kiu ni esperas ricevi de pli da donacoj (gresillon.org/donaco). En 2019 kaj 2020 ni restaŭris la tegmentojn de la du kromdomoj. Por restaŭri rapide la tegmentojn de la kastelo, ni serĉas investemulojn pretaj aĉeti societajn partojn: (gresillon.org/spip.php?article221).

Jen kelkaj belaj fotoj:  Grésillon sub neĝo, Grésillon dum nokto, Natur-Arto en Grésillon

Nia tria masko haveblas, jen ĝia foto.

Esperanto-Kulturdomo, Kastelo Greziljono, F-49150 Baugé-en-Anjou
kastelo@gresillon.org  -  +33 -241 891 034 (respondilo)

## RISKO – de Vladivostoko ĝis San Francisko

Mi informas vin, ke ni malfermis la novan ludon kaj ekde nun vi povas denove ludi. Ni esperas, ke multaj el vi revenos kaj partoprenos. Sukcesan riskumadon ni deziras.

Katalin Kovats, redaktoro; https://edukado.net/ludoj/risko

========= vortoj:  970 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2020. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.